

FRATO JAŬPIK'.

Trans Betuva Novelo de la Nerlanda

AŬTORA J. J. CREMER.

Tradukita en la internacia lingvo

„ESPERANTO”

de


J. HOLST.




96
E
38

— ELDONISTO — UTRECHT.







FRATO JAŪPIK'.

RIJKSUNIVERSITEIT UTRECHT



0305 1111

feh

96. E. 38

FRATO JAŬPIK'.

Trans Betuva Novelo de la Nerlanda

AŬTORA J. J. CREMER.

Tradukita en la internacia lingvo

„ESPERANTO“

de

J. HOLST.



H. HONIG — ELDONISTO — UTRECHT.

BIJLIOTHEEK
RIJKSUNIVERSITEIT
UTRECHT

*Het auteursrecht van het oorspronkelijk werk
berust bij de firma A. W. SIJTHOFF te Leiden.*


ANTAŬVORTO.

La novelo de kiu la sekvantaj paĝoj entenas tradukon, verkita antaŭ ĉirkaŭ kvindek jaroj de la Nerlanda aŭtoro J. J. CREMER, apartenas inter tiu literaturo de kiu estas malfacila kredi ke ĝi ni estus ĉiam- kaj ĉiua serĉata.

„BRUUR JOAPIK” estante verkita en la lingvo parolata en Trans Betuvo (Over Betuwe), parto de la regiono inter la riveroj „Rhijn” kaj „Waal” en Mez'-Nerlando, mi opiniis devi konservi en la tradukaĵo, la ofte tiel karakterizan envortigon de la Trans Betuvaj kamparanoj. Mi estas klopodinta, kiel eble plej multe mi povis, redoni ĝin, kaj esperas esti sukcesinta igi -ankaŭ per helpo de kelke da rimarkoj, aldonitaj al la teksto- ĉion sufiĉe komprenebla, kaj atingi ke la leginto estos impresita ke la originalo devas esti -kiel miaj samlandanoj diras-: „JUVELETO!”

la TRADUKINTO.

APRILo, 1908.



Se ne pluvus tiel ekstreme, vi povus vidi ke la Rhendigo ¹⁾ faras kurbon ĉirkaŭ kvindek paŝoj pli malproksimen. Nun, vi ne vidas ion de tio, ĉar la vento vipas vin la pluvon tiel forte en la vizaĝon, ke estas ne eblo teni la okulojn malfermitajn, aŭ la kapon rekte antaŭen.

Tien, je via dekstro, malsupren la devojon, vi estus vidanta farmokorton, por kiu — se estus pli bona vetero — vi deprenus vian ĉapelon: homo mia, kia korto! tiu al kiu ĝi apartenas estas nomata Rendert Wils, kaj la noma de la korto mem estas „la Alta Lando”.

Ne unu malantaŭrigardo ²⁾ pasinta, juna virino eliris la pordon de la farmodomo; ŝi intencis super-teni sian pluvombreton, sed pro la vento ŝi tuj estis ferminta ĝin; la jupo kovrante ŝian kapon, tiel, egale en troto, ³⁾ ŝi supreniris la devojon kaj kuris laŭlonge

¹⁾ Digo laŭlonge la rivero Rheno.

²⁾ Esprimajo por tre mallonga intertempo.

³⁾ Kiel en troto.

la digon, ĝis la lokon kie tiu ĉi sin kurbas. Tiam, tiam ŝi malfermis la barilon sur kiu estas pentrita „La Malalta Kampo”; la barilo refalis en la hokon, malantaŭ ŝi; ree devojo, nun malsupren.

La malantaŭpordo de la domo estis malfermita; rapide la juna virino trairis la stalon kaj la koridoron, kaj eniris sen iom da bruaĵo aŭ krakaĵo, kviete, tre kviete, en la kuirejĉambrom. Se vi estis vidinta tion, vi estis dironta: estas forkuro! kial tiu juna virino ne restas interne dum tian pluvegon?

Kial? aŭskultu;

En la kuirejĉambro de la Alta Lando kuŝas eto, mola-beleta eto, en kana lulilo; tie kuŝas la knabineto de kiu, nun antaŭ tri monatoj, la sanega Rikske de Rendert Wils fariĝis la patrino, tiel ĝoja pri ŝi kiel trijara infano pri denara pupo kaj tiel fiera kiel patrino povas esti... pri sia infano. La eto estas havinta ektrinketon, dolĉan ektrinketon, ne da bovinlakto, ne, sed da patrinlakto, de sia patrino mem, kaj poste la infaneto estas reendorminta.

En la kuirejĉambro de la Malalta Kampo kuŝas maljunulo en sia lito; tie kuŝas la viro kiu ĵus antaŭ ok monatoj alportis sian fidelan Miken, la patrino de liaj infanoj Hannes, Rinske kaj Jaŭpik, al la tombejo, flanke de la malgranda preĝejo, kaj tiam ploradis kiel infano kaj estis preĝinta: „Bona Patro,

alportu ankau min tien kie mia Mike ripozas; tie ĉi estas tiel malhela por mi; tie estas la lumo!"

Kaj la grizulo en la lito jus aŭdis la voĉon kiu diris al li: „Herbert, iĝos via vico Herbert! Jes, vi estos ree juna!”, kaj tiu kiu tion diris al li, premis prudente sian monon sur la palpebroj de la maljunulo, kaj Herbert endormis en la dormo morten.

Estis pluvego, sed eĉ se estus pluvinta brikojn, tamen Rikske estus reirinta de la infano pri kiu ŝi zorgis, al la mortolito de sia patro.

Kaj en tiu ĉambro? tie estas kuniĝanta krom la grizulo, kvin personoj. Rikske, la sola ankoraŭ en la vivo el seso da flinoj, staras apud la mortolito, flanke de sia pli juna frato Jaŭpik, Jaŭpik, kiu estas iel melantaŭema en kelkaj rilatoj, sed tamen tia supra bonulo!

Tie, sur seĝo, sidas la edzo de Rikske. Rendert estas viro kun afabla vizaĝo; bukraj haroj kaj belaj okuloj; sed liaj okuloj estas nun tiel melhelaj kiel la nebula ĉielo ekstere. Kontraŭe Rikske kaj Jaŭpik, staras Hannes, Hanes la plej maljuna el la deko, el kiu la patro esperas revidi sep, en la ĉielo.

Jenke, la edzino de Hannes, plenigas kruĉeton je varmega akvo; „malvarmaj piedoj”, ŝi estas aŭdinta diri la patron.

Hannes ne povis plori unu larmon kiam lia patrino

estis mortanta; nun li povas fari tion nek ankaŭ; sed senti, li sentas multe pli forte ol Rikske aŭ Jaŭplik; tiel li diras nun.

La plej maljuna filo tenas siajn okulojn daŭre direktatajn al la kovratuko, kaj kelkaj fojoj li diras sopirante: „estas ĉagrena!”

En tiu ĉi momenta la trio ekvidas ke la mortanta grizulo movas sian malgrasiĝitan manon super la kovratukon, kaj ekkaptas de liajn lipojn, apenaŭ aŭdebla: „Jaŭplik! Rikske!”; la juna virino prenas kun dolora plorego la manon kiu sin movis, kaj elŝprucas siajn larmojn sur ĝi.

„Aŭskultu Jaŭplik, aŭskultu” alparoletas ŝi al sia pli juna frato: „Jaŭplik!”, li vokas cin; kaj ankoraŭ pli mallaŭte: „Patro! Jen ni estas!”

Unu rideto ankoraŭ pliheligas la vizaĝon de la mortanto; sed la plej maljuna de liaj infanoj ne observas tiun lastan ekbrilon de la kuŝiganta suno; ne, ankaŭ ĉirkaŭ la lipoj de Hannes sin montris rido, sed alie kaj nur iel videbla, ĉar li estas aŭdinta ke la patro nomis nur du nomojn: Jaŭplik kaj Rikske; tiun de Hannes, ne; tiun, li ne nomis.

Ĉu la maljuna Herbert intence forsilentis la nomon de lia plej maljuna filo? Ne kredu tion; poste, li balbutis ankoraŭ unu vorton; estis: amo! tiam, li endormis.

Jes, kiam estas vespero, la suno kuŝiĝas ; iĝas malhuma, tie ĉi ! sed la lumo ne estas estingita ; ne, la kuŝiĝo estas ankaŭ la leviĝo !

Ankoraŭ ĉiam pluvego. Je la vesperkrepusko vi povus vidi Rendert kaj Rikske — la lasta kun skatoleto sub sia brako — rapide marŝante al la Alta Lando. Reveninta en ilia hejmo, Rikske ĉirkauprenas sian Rendert, kaj sopiras ke ŝi estas havanta ne plu patron, nek patrino, kaj Rendert, kiu kvietigas ŝin, deprenas la kovratukon de la lulilo. Rigardu : la patro frotas per siaj ruĝaj pugnetoj la okulojn, kaj oscedas kaj ridas. La patro kaj la patrino karesas kaj kisas la infanon, ĉar, ve ! la eto ne havas plu avon !

Ekstere, ankoraŭ iam pluvo. Interne, tie kie Herbert estas mortinta, sidas Hannes kaj Jenke ; la vespermango estas sur la tablo, sed ili ĝin ne nanĝas.

Hannes, kiu apogas sur la tablo subtenante la kapon per la mano, ĵetas laŭlonge la ruĝe brulantan lampeton malafablan rigardon sur Jenke, kaj diras :

Kiel ! ili ne estus privilegita ? Jes, privilegita ĝis la fino, kaj kial ? Tial ke ili scias paroladi laŭ la gusto de aliaj, tial ke ili scias flati ; ĉu ci kompanas ? tial ! Sed mi, mi ne estas de tia speco.

Hannes ! mi ne kredas ke la patro amis

ilin pli ol ci", diras la virino kies okuloj estas tre ruĝaj. Ne konjektu ĉiam ian malbonon; ci estas havanta la pruvojn kiel amplene la patro zorgis pri ĉiu el ni.

Pruvoj! kiaj pruvoj?

„Ĉu ci do estas forgesinta tion kion ci ĉiam timis", demandas Jenke boneme; „ĉu ci ne timas ke post la morto de la patro ĉiom devus esti vendata. Kaj Hannes, ĉu ci ne estas leginta kiel la patro, precize laŭ lia intenco, firmigas ke lia havaĵo restos nedividita dum kvar jaroj kaj estos administrata de ni, kaj ke tiam ci dedonos al ĉiu el Rikske kaj Jaŭpik unu trionon?" Pri tio ci tamen estis kontenta, Hannes, ĉu ne?

Kontenta, kontenta! jes tial ke mi estis frenezulo; kontenta tial ke la patro sciis tre bone al kies flanko estus la malprofito; labori, labori por Jaŭpik, malsati mi mem; tio estas la boneco de la patro, tio estas lia bonfaraĵo! Kaj kiuj estas tiuj kiuj kun amo — jes, kun amo — zorgis pri li? kiuj alie ol ni? Rikske kun sia flatbuŝo neniam faris ion; ĉu la patro estis maljuna aŭ juna, edziniĝi ŝi volis, edziniĝi i faris . . . amo! jes! pro la denaroj, por paradi, pro ekrigardi cin kaj aliajn per la nuko!

Tion, ŝi ne faris, Hannes! „Tamen senigi cin tion kio estas la cia" interrompas Hannes: Mi volas sileti

pri ĉio, sed la necesujo kun ora seruro, de la patrino, en kiu estas la grenadoj kaj mi ne scias kio plu, tiun ŝi ne estis permesita akcepti de la patro, sed devus esti lasita al ci kiel la edzino de la plej maljuna filo. Tial, ŝi turnis daŭre ĉirkaŭ la patron en liaj lastaj tagoj, kaj nur la ĉielo scias kion preter tio ŝi estas elflatinta el liajn manojn.

„Jes, la oran seruron kun la grenadoj mi dezirus havi volonte” diras la virino, sed tuj poste ŝi sekvigas: pensu ni ne plu pri tio; Rikske estis lia propra filino, kaj plu ne estas estinta en la necesujo.

„Mi scias ke estis pli ol tio en la skatoletoj” reprenas Hannes: kiam la patro ian tempon fianĉigis kun la patrino, tiam li prezentis al ŝi kiel unua donaco, preĝejolibron kun arĝentaj klampoj, kaj ŝi prezentis al li poŝhorloĝon kun duobla klapo; kie estas tiuj? Mi pretendas en la necesujo; ĉiuj en la kudrujo, mi diras. Tial ŝi forportis ĝin tiel ŝtelema sen iom diri. Leviĝante kaj direktante sian fingron al Jenke, li diras: Nu, estu ke la patro estas doninta ĝin al ŝi, ĝi estas forŝtelita al ci! al ci, kaj neniu alie!

Li ekvidas ke Jenke premas sian antaŭtukon kontraŭ la okulojn, kaj daŭrigas: nu, plori! mi estas tute tiel malĝoja kiel ci aŭ alia, pri la morto de la patro, sed falseco kaj ruzeco mi ne povas elporti. Ci povas esti malĝoja sen bruo; silentu! kiam ci

tenas ciajn okulojn sekajn tiam ci vidas pli klare, kaj ci vidos ke maldankeco estas monda rekompenco, kaj falseco homa eco silentu! ne defendu tiun Rikskan, almenaŭ ne ci, ĉar agaculino ŝi estas pri ci. Ĉu ŝi ne estas fanfaronanta ĉiam pri sia infano kontraŭe ci; kaj kial? tial ke ci estas jam edziniĝinta de ses jaroj kaj ankoraŭ havas nenian.

Jenke plore gas malantaŭ sian tukon. „Jes, estas ĉagrena, duoble ĉagrena!”, sekvigas Hannes; ni sentas tion duope, kaj tiu Rikske kaj tiu Jaŭpik, ili ĝuas dum ni suferas; tion, ili sentigas cin ĉiufoje. „Ŝi, mia fratino? falsa katino ŝi estas!”

Jenke plore gas kaj ne povas kvietiĝi; estas la morttago de la patro, kaj, ke iu ajn estus malestimanta ŝin tial ke ŝi ne havas infanon, tio dolorigas ŝin, forte, kaj profunde.

Pluvas ankoraŭ ekstere. En la malantaŭĉambro en kiu la maljuna Herbert estas demetita, vi povus aŭdi la enfluetadon kaj la gutadon en la pluvbarelon. Ne unu vivanta estaĵo estas en tiu ĉambro, sed absolute senbrue malfermiĝas la pordon, kaj eniras Jaŭpik. Jaŭpik, kaj malgraŭ la mallumon li alproksimiĝas la liton, li strekas per sia mano la malvarman vizagon de la patro, sopiras . . . kaj lasas la ĉambron.

Pluvas ekstere! pluvas super malbonulojn kaj bonulojn.

Kiam la maljuna Herbert mortis, estis Aprilo ; nuntage ili ¹⁾ skribas Auguston.

Estas ankoraŭ tre frue en la mateno. Ĉiuj havas la aspekton esti ĵus vekigantaj ; ĉiuj, ankaŭ la farmokorto „la Alta Lando” kaj ĝia najbara korto „la Malalta Kampo”.

La unua ridas gaje, la dua oscedas enue ; la unua estas jam pure en matenvesto, la dua ŝajnas serĉi al ŝtrumpoj kaj ŝuojn.

Ekstere ĉiuj vekigas. La koketo ne ; tiu ĉe Rendert kokokrias jam delonge ĝian „kukuluku-u”, kaj estas respondata de tiu de la „Malalta Kampo”.

Kiam vi rigardus iom pli atente, vi observus ke estas ankoraŭ tie ĉi kaj tie, ion kio montras sin pli malpli dornema. La urtikloroj malfermiĝas malrapide, la arbofolioj flirtas malforte, kaj vekigas la birdojn kiuj de tempo al tempo aŭdigas „Tji tjij”, por agordi iliajn voĉetojn. La radpostsignoj sur la Rhendigo estas ankoraŭ precize tiel profundaj kaj larĝaj kiel ili estas sulkitaj en la hieraŭa vespero sub la lastan grenŝarĝon kiun Rendert estas veturiginta al sia garbejo.

Tre frua mateno : vaporo super la rivero, roso

¹⁾ Oni.

super la kampoj, malvarmeta venteto, ruĝa horizonto, argenta-, ora ĉielo!

Super la „Betuvo”¹⁾ la suno leviĝas hele. Kion vi eble vidas, homojn ne.

Aŭskultu! jen estas io venanta! Jes, tie ili estas ambaŭ: Hanske kaj Graŭko. Kia beleta junulino, tiu Hanske! Kar' mia! kia aminda virineto! ĉirkaŭ dekok jarojn ŝi devas havi. Ŝia buŝeto estas kiel Majĉerizo, ŝiaj vangoj estas kiel rozoj, ŝia okuloj kiel sunetoj.

Jam sur iom da distanco vi aŭdas: hup! Graŭke, hup!... kaj Graŭke, la malgranda azeno kiu portas la du brilajn laktsitelojn, plirapidigas sian iradon. „Tjuko tjuk', Tjuko tjuk'", la malplenaj laktuoj sonas, kaj Graŭke paŝas tra unu el la du radsulkojn, dum Hanske paŝas tra la alian.

Hup! Graŭke, hup!, tien ili jam atendas nin. Tri ruĝaj, du nigraj, la Granda kaj la blankkapa — la grasaj bovinoj de Rendert — staras apud la barilon. Atendu nur „viretoj", ni estas venanta! Hup! Graŭke, hup! La azeno komencas troti, kaj Hanske trotras kune kun ĝi. „Tjuko tjuk', tjuko tjuk'!", hup!

¹⁾ La Betuvo estas efektive alia distrikto ol la Trans Betuvo. Tamen tiun ĉi lastan regionen oni nomas ordinare ankaŭ simple: Betuvo.

Graŭke, hup! kaj nun ili staras malsupre la digo, antaŭ la barilon de la herbejo.

La ĉeno de la barilo estas levita, la bovinoj - puŝitaj flanken, Graŭko - kondukita en la kampon, preta ŝi estas.

„Ĉi tien, Blankkap"! ci estas tiel peze ŝargita". Blankkapo staras senmove, kaj Hanske sidiĝas sur siaj kalkanoj, la sitelo antaŭ ŝi, apud la mamoo. Kiom da kremo, kaj kiel blanka, pensas Hanske, melkante. „Jes, blanka kiel la animeto de Hanske!"

Kiu la animeton de Hanske konas? Estas la junulo kiu, portante falĉilon sur la ŝultro, iras malsupren la digon-, trans la ponteton, al la kampo, kie Hanske estas melkanta la bovinojn; estas Jaŭpik, la frato de Hannes kaj Rikske. Estas Jaŭpik; Hannes lin nomas naiva; naiva, tial ke li estas iel malantaŭema pri lerni. Foje, li fariĝis tute kaptorna pro la literoj. La malgrandaj literoj: a, e, i, o, & u ne alportis da malfacilaĵoj, sed tiuj aliaj kun iliaj vostoj supren kaj malsupren, ne, ilin li ne povis ekkapti; estis krepuskiginta antaŭ liajn okulojn.

„Estas naiva, ĉu ne? tre naiva!" Ne naiva estas, ke li kalkulas parkere tiel bone kiel la plej instruita profesoro. Sed al tio Hannes ne aljuĝas iom da valoro. Kio estas nek ankaŭ naiva, estas ke li kantas en la preĝejo la psalmojn kaj kantojn sen helpo de

la kantolibro. Jes, ŝi, Hanske, kiu tien sidas melkadi, estas instruinta lin pri tio. Tiam, ŝi legis unue laŭte:

„Ho, boneco de Dio, neniam plene laŭdat, !”

kiun li ripetis. Detiamaniere ŝi daurigis, linio post linio; kelkafoje ŝi devis relegi la saman kvar fojojn, sed tiam . . . tiam li sciis ĝin por ĉiam, kaj neniam bezonus eĉ ombro de libro. Ne tiel naiva!

Kaj tamen naiva! Naiva, akcepti ĉiom kiel pura monaĵo, ne ekkoni falsecon aŭ malrektecon, ĉiam diri la veron, precize tion kion li pensas! Naiva en la malbono, ĉu ne vere? Jes, estas nur tre malmultaj homoj kiuj tion konsideras kiel tre saĝa.

La beleta Hanske kiu tien sidas, ŝi, ŝi, estas neniam ridinta pri Jaŭpik; kaj li? li konas la animeton de tiu aminda junulino tiel bone kiel la matenkanto.

„Bonan matenon”, Hanske!

Hanske rigardas malantaŭ sin: „Ho, Jaŭpik, ĉu estas ci”?

„Ĉu ci estas tiel varma, tial ke ci fariĝas tiel ruĝa”? demandas Jaŭpik.

„Ruĝa, mi? ne, — sed mi ne aŭdis cin veni.”

„Mi jam estis vidinta cin, kiam mi malsupreniris

la digon", diras Jaŭpik: „tiam mi sentis ke mi ankau ruĝiĝis estas beleta; tio estas okazita tri-.... ne, kvar fojojn, kaj ĉiam, kiam ni estis vidinta unu la alion delonge.” „Mi pensis, kiam mi alproksimiĝis se ni estus loĝanto kune en la sama dometo, mi estus vidanta cin ĉiutage, kaj mi ne ruĝiĝus tiel, Kiel strange ke estas la sama pri ci!”

Hanske, kiu melkadas „Blankkapon”, devas esti tirinta la mamon de la besto iel malbone, ĉar tiu ĉi saltas flanken, kaj la junulino alisidiĝas admonante: „kvietiĝu Blankkapo, stariĝu!”

Jaŭpik, apogante kontraŭ la barilon, rigardas al la melkanta farmistineteto, kaj diras post iom da tempo: „Antaŭhieraŭ, kiam ili estis parolanta pri ci, diris Kundert el „la Atako” ke ci havas tian beletan buŝeton; jes, tiom li diris, kaj nun, kiam mi rigardas al ĝi, mi pravigas lin, certe! Mi, pri mi mem, mi scias ke ci havas bonaĵon ¹⁾ sur la vizaĝo, sed kiajn okulojn-, harojn- aŭ nazon ci havas, mi ne povus diri. Ĉiel, Kundert estas prava, Hanske! efektive li estas-.

„For, ci knabo!”, Hanske diras: kaj al la Granda kium ŝi prenas nun: „kvietigu cin, Granĵon!, stariĝu!”

¹⁾ La boneco.

„La mamoo ĝenas ŝin”, rimarkas Jaŭpik! Atendu! . . . kaj li strekas la beston inter ĝiaj kornoj. — Post iom da tempo: „estas vere ke mi ne estis tiel vigla en la lernejo kiel ci aŭ alia, kaj ke -kiel frato Hannes diras — mi estas naiva en multe da aĵoj, sed rigardu: paro da manoj al labori mi havas, kiel la plej bona; ankaŭ estas en la vilaĝo multaj homoj kiuj ne scias iom pli ol mi kaj tamen estas feliĉe edziĝinta; tio estas certe! — Hanske, aŭdu! „kial ni ne edziĝus kune”?

Aŭdu kiel forte Hanske ridas.

„Ĉu tio gajigas cin tiel multe”? demandas Jaŭpik.

Hanske ne ĉesas ridi; Jaŭpik devas ridi tiel forte kaj ili ridas ambaŭ al sufoki. — Estas la unua fojo ke Hanske ridas pri Jaŭpik.

Grando, malpacienca, iras iel flanken kaj tuŝas la laksitelon kiu pro tio inkliniĝas; Hanske ekprenas ĝin, sed ondo da lakto eljetiĝas sur la herbo.

Ili ridas ne plu; „estas pekaĵo!”¹⁾ aŭdigas Jaŭpik; „Jes, pekaĵo”, ripetas la beleta junulino, kiu ankaŭ riproĉas sin mem tial ke ŝi estas ridinta pri tiu honesta Jaŭpik.

„Ĝu, plaĉus ankaŭ cin, se ni estus loĝanta en la

¹⁾ Domaĝo.

sama dometo"? demandas Jaŭpik, kaj li daŭrigas: „tio estas turnanta en mia kapo delonge.”

Hanske melkadas fervore kaj direktas siajn okulojn al la mamoo. „Jaŭpik, ne pensu pri tio”, ŝi diras fine, tre mallaŭte; mi estas ankoraŭ tro juna por pensi pri edziniĝi; kaj ci, Jaŭpik ci

„Nu, adiaŭ”, diras la junulo, kun iom da malĝojaĵo en sia voĉo: „adiaŭ Hanske, laboru plezure!”

„La saman”, deziras la junulino. Ŝi melkas, kaj restas melki, ĝis la mamoo estas malplena, kaj la siteloj — pleniĝitaj.

Tre malproksimen si aŭdas Jaŭpik akriĝi lian falĉilon; tien ŝi vidas lin falĉi la longan herbon; kaj ŝi, ŝi rigardas tiel malĝoje, Bona Jaŭpik, Naiva Jaŭpik, edziniĝi kun li?

La kupraj siteloj pendas en la rimenoj ĉirkaŭ la dorso de la azeno, Graŭko estas deligita, la barilo malfermita: „hup Graŭke, hup!”, supren la digon, kaj hejmen!

La suno brilas al la ĉielo, sed laŭlonge la sunetoj de Hanske iras nubetoj Jaŭpik! kaj Kundert el „la Atako” estas dirinta ke ŝi estas bela. — „Hup Graŭke, hup!”

Ĉirkau unu horo post la reveno de Hanske en la laktejo de la granda korto de Rendert, sin trovas Hannes Lamers ĉe la teraj remparoj sur kiuj la tabakplanto estas kulturigata.

Kia estas la aspekto de Hannes Lamers? Vidu nur! profunde kuŝigataj peĉnigraj okuloj, malaltaj brovoj, mallonga-dika nazo, larĝa buŝo kun tre maldikaj lipoj, flavpalaj vangoj, la kapo iom antaŭen sur longa kolo, mallonga trunko, longaj kruroj; tiel estas Hannes.

Kion li faras? Hannes pikas limakojn. Vidu: li tenas lignan pikilon en sia mano, li rigardas al la tero kaj al la tabak-folioj. Tie li vidas limakon; pik'! li pikas ĝin al la pikilo; jen ankoraŭ unu, pik'! ankoraŭ unu, pik'! Tiel, ĝis la pikilo estas plena je limakoj; tiam li pikas la ligneton sur kiu la limakoj estas amasiĝitaj en la teron, apud la finiĝo de la remparo, kaj prenas alian pikilon; detiamaniere li daŭrigas sian laboron. Estas abomena! ĉu ne? al fariĝi naŭzema! sed, estas necesa, ĉar la limakoj manĝegas la foliojn.

La unu aŭ la alia! vi povas serĉi limakojn, kaj esti plezuriĝata trovi neniun; kaj, vi povas esti plezuriĝata trovi nombron. La unua estas la plej natura; la lasta estas tute laŭ la gusto de Hannes. Li pikas ilin, volonte!

Kaj kial li pikas ilin kun tiom da plezuro? tial ke ankaŭ centoj da pikiloj pikas lin; en la gorĝon, en la kapon, en la bruston, en lian koron kaj mi ne scias kie ankoraŭ plu.

Aŭdu kion Hannes pripensas interne:

Thomas, la plej ega krudulo kiun mi konas, membro de l'estraro! kaj mi? — La pastro kiam li estas sur lia predika seĝo ne faras ol humiligi kaj insulti pri ĉiu ajn; kaj li mem? estas frenezuloj tiuj kiuj plensarĝas lin je buloj da butero, je legomoj kaj ovojn. Se mi farus precize la malon, — ludi „Bela Vetero” kaj „Se Plaĉos Vin” — se mi ŝmirus ĉiun ajn iom da belajo sur la maniko, al mi, anstataŭ li, neniu donacus ĉe uncbuleton da butero aŭ iom da malgrasa ŝinko. Lasu ilin agi kiel plaĉos ilin; ke ili humiligu kaj insultu, kaj ke ili sufoku en la graso! Rendert! hierau li enportis sian lastan gren-sarĝon sekan kaj bonan en la garbejon! Mi, la duono malbona kreskitaĵo; ĉe mi, ĉiuj folioj tute mangigitaj de la limakoj; ĉe ili, ne unu folio difektigita! devas nur toleri ke tiu diablo estas prosperanta; monon li havas pli multe ol tro! igas sur la vendejo por ĉiuj ajn la plej altajn prezojn! jam infano en la unua jaro, kaj ree unu venonte! Ĉion por li! min, ĉio malsukcesas; de tia justeco mi ne havas la komprenon! — For! tondra limako! pik', pik'!

Estas la kvara horo post la levigo de la suno. Jenke estas pretiginta la matenmanĝon en la kuirejĉambro de la Malalta Kampo. Ĉiuj estas kuniganta: la mastro, la mastrino, Jaŭpik, kaj la geservistoj kiuj manĝos kune kun ili.

Preĝi..... Manĝu kun gusto!

„Estas beleta ke de kelkaj tagoj, ci ĉiam donas la sekalpankrustojn al la aliaj aŭ prenas ilin ci men” diras Hannes iel akre al Jenke: mi, mi povas alrigardi!”

„Ha Hannes, ĉu ci volas havi ilin”? demandas la terurigita virino: ci ne povas elporti ilin, ci estas dirinta, tial ke ili kaŭzas cin doloretan en la stomako! ĉu ne, Hannes? „Kiam ci estas altrudanta ĉiujn al mi; kuregi aŭ halti” enfalas Hannes. „Kiam ili estas freŝaj, mi manĝas ilin tiel volonte kiel ĉiu alia!”

„Bone Hannes, jen ci havas la miajn” diras Jenke. „Ci estas freneza! ĉu ci pensas ke mi estas infano”? ekkrias Hannes, kaj li reĵetas la panon kiu estis alŝovata al li.

Jenke sentas iom da malseketaĵo en siaj okuloj kaj dum ŝi estas metanta la rifuzitan panon antaŭ sian bofraton, ŝi diras: „jen Jaŭpik, mi ne manĝos ĝin”.

Atentu tiun ekrigardon de Hannes al Jaŭpik.

„Doni ĉiuj al li, li ĉiam profitante, li, tiu malsaĝulo kiu ne povas ekkoni A aŭ B; li kiu estas vivanta al la malprofito de aliaj kaj devus esti el la mondo de longe!” Al Jenke je ofendanta tono: „Nu, metu cian fraton sub vitran kovrilon, aŭ en alkoholon!” kaj al lia frato, prenante la lignan panujon kaj alŝovante tiun ĉi al li: „Nu, ĉu ci ne prenis ĉiom”? „Ne Hannes, mi dankas cin” respondas la junulo: ne gustas min, iras min tiel malfacile tra la gorgon. Al Jenke: „tuj mi havas ion al diri al ci”. Jaŭpik eltrinkas sian kuveton da kafo..... ĉu li ruĝiĝas tiel forte de tio?

Hannes igas grandajn okulojn. Kvieteco; nur malforta tintado de tasoj kaj kuvetojn, kaj la kraketado de la fajro.

„Tuje ion al diri al Jenke” pensas Hannes: „al Jenke; ne al mi” — „tiuj du lavas sin en unu vazo!” „Estas eble pri fari ion kontraŭ min. Ĉiam tiun babilaĵon: kontentu Hannes; bone, sed por tio ili devas kontentigi min. Nu, tiu kiu pikos min, tiun mi pikos ankaŭ!

Je la momento en kiu Hannes ripetas tiun ĉi minacajon en si mem, malfermiĝas la pordon duone, kaj la mastro de la Alta Lando rigardas ĉirkaŭ ĝin en la ĉambron. Estas bofrato Rendert kiu

deziras: trinku kun gusto, dum li demandas per siaj okuloj, ĉu mi ne ĝenas cin?

Ni estis ĵus dankonta, alvokas Hannes al la envenanto; li donas signon de interkompreniĝo al la siaj, kaj promas sian ĉapon antaŭ la okulojn.

Rendert retiras sin, bedaŭrante ke li venis al demandi ion al Hannes; tamen li restas kaj intencas atendi ĝis Hannes estos dankinta.

Se vi povus rigardi malantaŭ la ĉapon de Hannes, vi vidus falsan ridon! la linako estas pikota!

Iom poste la du bofratoj staras la unu kontraŭe la alia.

Ĉu ci volas pruntodoni al mi cian pajltranĉilon? mi bezonas ĝin nur unu tagon" demandas Rendert.

Estas defektita, kaj ĉe la forĝisto, respondas Hannes.

„Cia pajltranĉilo"? Jes, mi bedaŭras mi ne povas helpi cin, sed preter tio, mi bezonas ĝin mi mem!

„Ci bezonus ĝin ci mem"? estas tre okaze, en tiu ĉi sezono!

„Kaj kial ci, jes"?

„Mi bezonas tranĉaĵon por miaj ovkorboj" estas la respondo de Rendert. Eble mi povas fari ĝin per ordinara tranĉilo; mi dankas cin, Hannes; bonan matenon!

Rendert marŝas rapide hejmen, pripensante ke

estis ne saĝa demandi ion al Hannes. Pro la najbareco kaj la parenceco mi intencis ne peti al alia. „Paco kaj afableco, jes”, sed ian demandi — neniam plu!

Jenke estas en la laktejo, kaj Jaŭpik kiu sekvis ŝin, diras: „Aŭdu, Jenke!” Jenke aŭskultas, kaj tion kion ŝi sciiĝas estas tio kion li estas dirinta en la frua mateno, al Hanske, tiu beleta malgranda Hanske. Kie ĝenas lin, li ne povus klarigi; li kredas, en la brusto aŭ en la gorgo, ĉar de longe li ne povas pensi pri Hanske, sen senti tian strangan ekpuŝon, precize kvazaŭ li ne povas spiri. Jen ree!

Jenke rigardas kvazaŭ ĉi vidas mortinton reviviĝi. „Ci edziĝi, Jaŭpik!” diras Jenke post iom da tempo, tute ekmiregante, dum serio da pensoj trairas ŝian kapon. El ĉiuj de tiuj ĉi pensoj, tiuj pri Hannes estas la ĉefaj. Kiel li koleris kiam Rikske edziniĝus; ĉu li ne diris ofte ke Jaŭpik neniam estus memstaranta tial ke li -kvankam ŝi ne povas kredi tion- estus duonfreneza? ĉu li ne estas jaluza kaj malafabla pri Rendert, tial ke li estas iom pli riĉa? kaj... ĉu li elportus ke Jaŭpik eble iĝus feliĉa kun Hanske, kiu estas pli ol bonhava! la heredparton de Jaŭpik li nomas -kvankam absolute maljuste- la sian! — „Sed... Hannes”?

La mastro de la Malalta Kampo estas ne malprok-

sime. Al la pordo de la laktejo, li estas aŭskultinta. Kiel false li rigardas, la enviulo, tiel flava kiel safrano!

Atendi pli longe, li ne povis. Jen ili estas trio, kaj Hannes devigas sin mem al diri kiel eble plej afable li povas, ke li okaze estis audinta, kelkajn vortojn, kaj ke li bedaŭras observi ke Jaŭpik tenis ilin en sekreto pri sia frato, kaj ke estas ne bona esti malantaŭtenema! — kaj, tre boneme, li daŭrigas; „jes, mi bedaŭras tion, Jaŭpik! sed estas tial, kial ci estas ankoraŭ infano kaj naiva; — ci, ci ne povas plibonigi ke Dio estas kreinta cin tiel, kaj ne alie; estas tial! Ci devas esti pli konfidema; nun Jaŭpik, nun mi sciigas okaze, ke ci estas parolinta kun Hanske pri edziĝi!”

Jaŭpik ruĝiĝas forte. La maldikaj lipoj de Hannes estas tute malvideblaj, kaj dum li frapas sian fraton intime sur la ŝultron li diras tre afable, mieldolĉe: „kiam la patro estis mortanta li diris „Amo!” ĉu ne, Jaŭpik?”

„Jes, ĝuste,” estas la respondo.

„Sed, ĉu ci scias kion la patro estas dirinta la tagon antaŭ ol sia morto?”

„Ne!” skuas la junulo.

„Tion kion li diris li estas dirinta li diris: Hannes, li diris, „kiam Jaŭpik iam pensus pri

virino aŭ edziĝo, tiam Hannes, diru al li: „ke mi estas malpermesinta tion al li, sur mia mortolito, tial..... tial ke..... li fariĝus tiam, profunde malfeliĉa”

Jaŭpik staras senmove. Nun, vi estus inklinanta diri: „naiva Jaŭpik!”

Jenke rigardas teren,..... ĉu estus vera aŭ mensogita? Kion ŝi povas fari alie ol silenti?

Kaj Hannes? „Sufiĉas, hodiaŭ” li diras, elirante al la kampo por piki limakojn.

La farmokorto de Rendert brilas en la suno kvazaŭ ĝi estas orita. Ŝajnas tie ĉion tiel beleta kaj gaja, ke estas nur plezuro rigardi al ĝi. Domo, korto, bestoj, ĉiuj ridas. La grenkampoj ondigas per malforta vento, la kokinoj aŭdigas siajn „taŭke taŭk etaŭk”, la bovidoj kun la vosto en la aeron ĉirkaŭsaltas en la fruktarbejo kvazaŭ ili estas frenezaj, kaj Graŭko blekas gaje.

Ĉion ridas kaj gajigas. Ankaŭ la cikonio estas alfluginta, kaj kiam ĝi rigardas el sian neston malsupren al la farmodomo, tiam estas kvazaŭ ĝi volas diri: „Danko! ne bezonata; plezurigas min tiel multe kiel ci”. Kaj, aŭdu kiel ĝi batigas siajn flugilojn en la aero.

La longbeka cikonio scias iom plu; ĉu ĝi eble...?
 „Cikonio supre, beno malsupre!” estas la diro en la „Betuvo”.

Kvietiĝu, ĉar tie en la granda ĉambro estas jam sufiĉe da bruajo por la virino en la ĉambreto flanke, la virino kiu bezonas kvieticon, kvietecon kaj trankvilecon, en ŝia tre granda ĝojo.

La anthaŭhieraaŭan vesperon je la kvarono de la deknua horo la cikonio estas alportinta eton — kiel diras la Betuvaj kamparanoj-. — Ravige, tia eto!

Je la trikvarono de la deka Rendert estas fariĝinta nerva, tre nerva, sed lia Rikske tiom pli ege. Je la kvarono de la deknua,.... Dank' al Dio, jen ĝi estis! Bela eto, rŭga eto, dika eto! Ravige, tia eto! Rendert ridas mallaŭte pro ĝojo, tiam li iras kun sia infano al la lito de Rikske, kaj paroletas: bele! kara mia; mi estas la tria Rendert, jen estas la kvara-; tiam, li kisas sian karulinon sur ŝia nazoo kaj buŝo, ĉie kie li povas, kaj la eton tre prudente sur lia mola buŝeto; tiam, tiam li realportas la eton al la gardistino, kaj iras eksteren, plorante kiel infano: „Dank', dank' al Vi, Bona Patro, pro tiom da bono! je kio mi meritis tiom da Amo”?

Estas la tria tago. La juna virino ne havas eĉ ombron de febro, kaj ŝi ridas, ĉar la malgranda-

Mike — nun dekunu monata — sur la brako de onklino Hanske, metas siajn fingretojn sur la vange-tojn de sia frateto, por vidi ĉu li ne estas pupo. „Ne kara Minjo! rigardu nur” diras Hanske; kaj ŝi, kiu ĵus eniris por anonci ke „estas popolo” por viziti la patrinon, frotetas la malgrandan kapeton de Minjo. La eto, kiu estas havanta ektrinketon de sia patrino, globvangetiĝas, kaj Minjo frapas siajn manetojn, kaj krias pro plezuro.

Kvietiĝu, Minjo! estas jam tiel brue en la granda ĉambro!

Konatoj el la najbaraĵo revenante de la vendejo estas alveturinta al la Alta Lando, por gratuli Rendent pro la naskiĝo de lia filo, kaj koncernante la bona irado.

Kvin farmistoj, maljunaj kaj junaj, sidas en rondo, fumante el longaj pipoj. Du pezkorpaj farmistinoj kaj unu juna farmisteneto kun beleta vizaĝo, kolo-ras la grupon per iliaj diferencantaj vestaĵoj.

La virinoj sidas larĝe kun siaj piedoj sur mal-varmaj fajropiedbenketoj ¹⁾, kaj rigardas al la pordo

¹⁾ Nerlanda vorto: „stoof” kestforma — ligna ben-keto, interne kovrita de lado, en kiu oni metas ŝtonan poteton je fajro, por varmigi, aŭ sekegi, la piedojn. Ĝi estas tre universala en la kamparo, sed fariĝas maloftaĵo en la urboj.

ĉu Hanske ne revenos por enirigi ilin en la ĉambreon de Rikske.

Rendert verŝas vinon al la farmistoj kaj oferas glasetojn da anizo al la virinoj. Li havas mienon kvazaŭ li ridos dum tute sian vivon, kvankam liaj vizitantoj plendas ke la butero ne estas profite vendata, kaj ke la poligono ne plu iom valoras. „Povas esti” li respondas, kaj oferas gastame: „ĉu, ankoraŭ iom da vino”? kaj al Kanjo, la juna virina vizitanto: „nu, knabino, malplenigu cian glaseton!”

„Ne, mi dankas al ci, Rendert”, diras Kanjo. „Kiel! ĉu gustas ne bona”? demandas Tenes, kaj plu, ridante, li faras iel trivialan rimarkon en ligo kun la anizo. Kanjo estas iom ĝenata. Kundert -vi konas lin-, Kundert el „la Atako” rigardas al Kanjo; kaj knabino ridiĝas, sed ne kuraĝas levi la okulojn. Kundert plezuriĝas malantau sia ruĝa naztuko, kaj la dikaj farmistinoj skuas pro ridi, tiel ke iliaj seĝoj krakadas. La viroj -kutime ne ridemaj- havas da malfacilaĵo fumadi iliajn pipojn; kaj Rendert, . . . Rendert ridas ankaŭ, kaj deziras: „ĉiu tiel feliĉa kiel ni”, por mi mem, malpli sufiĉus, sed infanoj estas benaĵo; jes, beno de Dio!

Je la momento en kiu la feliĉa patro elparolas tiujn ĉi vortojn, la du pordoj de la granda kuirejĉambro malfermiĝas samtempe.

Tra la unuan eniras Hanske kun la malgranda Minjo sur sia brako, kaj dum ŝi invitas la virinojn al veni vidi sian fratinton, ŝi observas la palpebrunon kiun Kundert donas al Kanjo, al Kanjo, kiu leviĝas por ankaŭ iri vidi la akuŝintino.

Tra la alian — la koridorpordo — eniras konato. Estas Jenke de „la Malalta Kampo”. Kvankam estas jam la tria tago de Rikske, venas Jenke nun por la unua fojo, sed ŝi estas sekvata de alia, de la flavpala Hannes, kiu estis dirinta ke ŝi devus nur atendi visiti Rendert, ĉar alie li rifuzus iri kune kun ŝi.

Jenke rigardas tre ĝenate kiam ŝi deziras: „Bonan natenon”, kaj mallevas la okulojn kiam ŝi diras al sia bofrato Rendert: „Mi gratulas cin pro cia filo, kunvivu kun li ĉian feliĉon!”

„Mi dankas, mi dankas al ci!” respondas Rendert tutkore kaj Hannes, kiu post sia edzino, estas murmurinta „la saman”, donas -kiel ĉiam- manpremon kiu sentigas sin kiel telertuko, kiel nenio.

Hannes ekvidas samtempe ke la virinoj, kiuj estas dezirinta „al la revido, Rendert!”, tiras iliajn jupojn en la krispoj, kaj, antaŭrataj de Hanske, eniras la akusĉambron.

„La aliajn li lasas eniri en la ĉambreton, sed proprajn parencojn ne.”

„Sidiĝu Jenke!” diras Rendert; frato Hannes, prenu seĝon!

„Prenu seĝon!” — dévas iri mi mem por preni ĝin!

„Ni venas nur, al vidi Rikske” diras Hannes, ni estas havanta nur tre malmulte da tempo; venu Jenke, eniru nin rapide en la ĉambreton!

Jenke ne scias, ĉu.... eble....

„Atendu, mi petas al ci, unu malantaŭrigardon” diras Rendert; la virinoj estas ĵus enirinta, tro da bruajo per unufoje ne konvenus..... ankoraŭ unu minuteton. sed, sidiĝu! Jenke. tie? tie ĉi? Hannes! prenu ankaŭ seĝon!

Jenke sidiĝas..... Rendert jam tenas la botelon en sia mano, oferante al sia bofratino „glaseton”? kaj al Hannes: „trinku ankaŭ iom!”, dum li asignas lin la pipojn kun la tabakskatolo, kaj la arĝentan fajrujon.

„Sentigi aliajn ilian nehavon” pensas Hannes, kaj samtempe li detenas la manon de Rendert kiu intencas plenigi glason por li, dirante: „neniom el tia aĵo! ni ne drinkas!”

„Jenke, ĉu ci prenos iom da anizo”? demandas Rendert.

Jenke alrigardas Hannes..... kaj respondas: „Ne, vere ne, mi dankas al ci!”

La ĉeesto de Hannes malbonigas la gajan humoron de la ceteraj farmistoj. Ili „tiras malrektajn vizaĝojn” kaj komencas paroli pri la vetero, ke ŝajnas kvazaŭ fulmotondro estas alvenonta, kaj ke tial estas necesa iri hejmen.

Jes, estas tondraj nuboj ekstere, kaj ankaŭ interne estas malluma nuboj. Hannes estas ĉiukonata; do ne mirindaĵo ke fariĝas premata, kaj eĉ malfacila por Rendert, resti gaja.

Sed, kie estus Jaŭpik? demandas Rendert, post ol Hannes estas ĉirkaŭrigardinta dum longa tempo kvazaŭ li ne povus trovi seĝon, sed fine sidigis. „Mi tute ne komprenas.” li daŭrigas, kaj Rikske estas jam ofte demandinta, ĉu li ne venus.

Jes, diras Hannes, farante strangan movaĵon per la mano laŭlonge sian kapon, estas tre ĉagrena nuntempe, preskaŭ ne mastrumebla!

Kio, kiel? demandas lia bofrato.

Jenke krispas sian jupon; ĉiu eldemandas Hannes per siaj okuloj.

„Stranga en la kapo” diras Hannes mallaŭte; ofte li ne parolas unu vorton, aliafoje li estas bruega, furioza! ĉu ne, Jenke?

Ĉiuj alrigardas la virinon. Jenke estas tre ĝenata, kaj diras apenaŭ aŭdeble: „jes, . . . naiva!”

„Kia, bonulino mia! mi neniam aŭdis ion pri tio”

rimarkas Rendert ekmiregante, Jaŭpik stranga en la kapo!

„Jes, neniŭ volas kredi tion”, estas la respondo de Hannes; de jaroj estas ofte sceno, kaj en la lastaj tagoj. . . . Hannes igas vizaĝon per kiu vi estus timiĝanta.

Se mi estis sciinta tion, mi certe estus veninta vidi lin, diras Rendert. Kaj nun ne plu rido estas videbla sur lia vizaĝo.

„Restu nur trankville hejme” sonas el la buŝo de Hannes; en la ĉeesto de aliaj li ŝajnas sanegulo, sed tuj post ilia foriro ni havas la bruegon tiom pli forte” ĉu ne vere, Jenke?

„Nu, ĉu mi iam en mia vivo!”¹⁾ diras Rendert kapskuante, kaj pripensanta li daŭrigas: „do estos utila ke mi prenu lin tie ĉi dum tri aŭ kvar da tagoj; aliaj vizaĝoj, alia ĉirkaŭo.”

Tondre! krias Hannes kun insulta rido; kvazau mi kaj Jenke ne zorgas bone pri li!

Ne Hannes! mi ne timas pri tio! vidu, mi sole pensas: Jaŭpik amegas florojn, kaj ci scias ke Rikske havas belajn bedojn malantaŭ la domo.

„Florojn kaj aliajn aĵojn, ni havas sufiĉe ĉe

¹⁾ La tie ĉi mankantaj vortoj -kiujn la leganto facile divenos- estas neniam dirata.

ni" enfalas Hannes, kaj kiam li estas obstina, li ne rigardos al ia ajn!

Rendert ne lasas sian opinion, kaj la aliaj visitantoj konsentas ke „ia alia" estas tre rekomendebla. Li povus akompani Gart' kaj amuzi sin je la ŝafoj; ĉu ne? li ankaŭ amas ŝafoj, kaj tiujn, Hannes ne havas.

„Mi scias de longe ke ci tenas ŝafojn" grinčas Hannes; sed ni estas veninta por vidi Rikske — ni devas rapidigi nin.

Feliĉe! jen la du virinoj kaj Kanjo kaj Hanske reeniras la kuirejĉambbron. „Neniam en nia vivo, ni estas vidinta tian beletan eton! kiaj molaj braketoj, kaj kia belhara kapeto! kaj la patrino, kiel bone ŝi fartas! estas plezuro vidi ŝin.

„Nu Jenke" pelas Hannes, kaj, malantaŭ Jenke, li ŝovas en la ĉambreton, el kiu la virinoj ĵus revenis.

Jes, daŭrigas unu el la virinoj: plezuro vidi tion; kiaj belaj bluj okuloj en lia kapeto, precize la okuloj de lia patro!

Ekstere la tondraj nuboj estas ankoraŭ al la horizonto, sed el la ĉambbron la malluma nubo estas — almenaŭ intertempe — malaperinta.

Vidu nur! Rendert ridas ree. Ĉu la malgranda Rendert ne similas la grandan? Rendert

similas precize sian patron, la avon kiu estas tiel benignata mortinta, jes!

Ne kvin minutoj poste la visitantoj estas lasinta la ĉambron; Rendert, kies koro estas altirata al Rikske, ŝargis sian fratinon je la elkonduko, kaj ĉiu estas dirinta „bonan tagon, Hanske!”, kaj Kundert el „la Atako” ankaŭ estas dirinta „bonan tagon, Hanske”, kaj tiam, tiam li pinĉis Kanĵon en ŝia brako, tiel, ke ŝi kriis „ĉesu! foriĝu!” kaj puŝis ŝin en la veturilon kun multe da rido kaj bruo, ege ne sufiĉe. Tion vidis Hanske, kaj tiam la veturiloj foriris, kaj Hanske estas reenirinta.

La visito de Jenke kaj Hannes al Rikske, ne daŭris tre longe.

„Ĉu, ci jam foriras” demandas Rikske, kaj Hannes respondas ke ŝi devas kompreni ke li estas laboranta kiel ĉevalo de la mateno ĝis la vespero, kaj ke ŝi ne devas atendi eldonon de gajno je la fino de la jaro, sed ke li antaŭmetos alian kalkulaĵon. „Mi al neniuj detenos la lian” estas lia konkludo, sed mortigi sin per labori al la profito de alia, kaj suferi malsaton li mem por tiu, estas ne farebla. Kaj Hannes intencas foriri de sian fratinon.

Rendert aŭdas tiujn lastajn vortojn kun miro;

ĉu li renkontus tiom da malprospero..... sed, estas nun ne la tempo al paroli pri la kulturo.

Vidu, kiel beleta infano! diras Jenke, kiu rigardas ankoraŭ unu fojo la junnaskitan en lia lulilo.

Mi ne scias ian de tia! bulkapo mi dirus; similas Rendert..... bonan vesperon.

Rikske kaj Rendert aŭdis tiun rimarkon de Hannes; tamen, Rendert respondas al lia saluto. Kaj Jenke, ŝi paroletas: „la pliboniĝo al ci, kaj la sano al cia infano!” La patrino premas la manon de sia bofratino, dirante: „Se ci ankaŭ estis havanta unu!”

„Se ci ankaŭ estis havanta unu!”, estas la unua kiu Hannes murmuris, kiam li eliras la barilon de la Alta Lando; „kion mi estas dirinta cin, Jenke”? humiligi, turmenti, sin ŝajnigi la..... tion ili faras, kaj nenian alian! defendu ilin, se ci povas! blindigi aliajn! oferi vinon, anizon kaj kia ne plu! festeni ili, lasi labori aliajn, tion ili povas! Ne parolu pri tio; kial tiu argenta fajrujo, kial tiuj argentaj ŝtopiloj sur la boteloj, kaj tia fanfaronajo pri iliaj belaj floroj, kaj iliaj ŝafoj? Kaj ankoraŭ plu: ĉu ci ne vidas ke ili antaŭirigas aliajn al propraj parencoj? tiuj aliaj povis eniri, ni atendi! jes, ni atendi!

Sed pli ege ankoraŭ, Jenke! ili pikas nin en niajn korojn, cin tiel kiel mi; tion ili faras ju pli longe des pli forte! — Imitante, je agacanta tono: „Se ci ankaŭ estis havanta unu!” Ĉu mi ne estas dirinta tion al ci, Jenke, ke ŝi estas pikinta cin? Jes, ploru nur, nun ci sentas tion ci men! „Ke Dio trafu ilin! tion Li devas..... tion Li faros!

Hannes fariĝis nepriskribeble flavpala, kiam li eniris sian domon flanke de Jenke, Kaj ŝi? jes, ŝi inklinis al defendi Rikske, sed tamen, Hannes estas prava pri tiu ĉi kaj tiu; kaj, jes, estas tro da diferenco! kial aliaj..... kial ni ne?

La suno kuŝiĝas, kaj la fulmotondro alproksimiĝas. Jaŭpik estas nenie trovebla. Estas ne verŝajne ke li estas elirinta, ĉar de la mateno en kiu ni vidis lin, li estas brulvundita al la piedo, okazita de malgardeco de Hannes kun kaldrono je bolanta akvo, kiu malhelpas lin eliri. Tamen, li estas for, sed kiel kaj kien?

Kiam Jenke kaj Hannes lasis la Malalta Kampo, Jaŭpik malkvietiĝas. Jes, Hannes estas dirinta: „Se ci havas tiajn idiotajn planojn pri Hanske en la kapo, ci pekos kiam ci iros al la Alta Lando. Memoru, kion la patro estas dirinta!

„En ĉiu kazo” pripensas Jaŭpik, kial mi ne

irus vidi Rikske, estas jam la tria tago post ŝia akuŝo; mi deziras tiel forte al vidi ŝin. Hannes estas dirinta, ke marŝi estas danĝere por mia piedo; sed tiu piedo ne estas tiel grava. Iru mi, nur!..... Rikske, la bona Rikske!..... ŝia nova infaneto! — Hanske? Ne, ne pro Hanske, pro Rikske! Iru mi!

Jaŭpik starigas;.... dek paŝoj; iras bone, la piedo ne dolorigas! Ekstere;.... kiel dancemiga!..... — Iradi, ne dolorigas. Kiam li prenis la plej mallongan vojon, li eble renkontus Hannes kaj Jenke. Maldekstren, tra la fruktarbejon.

Kaj Jaŭpik daŭrigas sian vojon; tamen, ju pli alproksimiĝanta al la Alta Lando, des pli laŭte la mensoglingvo de Hannes resonas kiel vero en la koro de la noblulo.... Ci iras ankaŭ pro Hanske, kaj Jaŭpik, tio estas peki! sed Rikske,.... vere, li iras nur pro Rikske.

Estas jam vespero; estas malluma- tondra ĉielo. Malantaŭ la domon de la Alta Lando sin trovas la gren'- kaj fojnprovizejoj. Antaŭ la domo staras Rendert, observante la veteron. Li pripensas multe da aferoj; precipe, kiel Rikske ĵus esta dirinta: „kiam estos la nasktago de Jenke, ni prezentos ŝin la necesujon de la patrino kaj la oran seruron kun la grenadoj, kvankam la

patro estas doninta ĝin al mi, kaj mi estas ŝatanta ĝin tre forte; ni havas tiel multe! Sed Hannes? „Amo!” diris la patro!

Post la laciĝo de la tago, Rikske enfalis en bonfaranta dormado; ankaŭ la junnaskita dormetas en lia lulilo.

Ĉu estas neniu alia en tiu ĉambreto? Jes tamen; rigardu nur bone. Tien, apud la lulilo sidas — nun preskaŭ nevidebla — la fratino de la familio, bela Hanske.

Ŝi rigardas tra la fenestron al la malluma ĉielo, kaj larmoj malseketigas ŝiajn okulojn. Jen jen, ŝi vidas malfortan rebrilon de fulmo, kaj aŭdas la sonadon de la tondro. Kaj, la malgranda Rendert aŭdigas sian krieton, kaj la onklino Hanske lulas la infanon, kaj kantas sian kanteton:

Eto mia, eto flor',
 Eto mia, neniam plor',
 Dormu trankvile en lulilo mol',
 Patrino ĉin gardas, ĉi ne estas sol'!

Kaj Hanske pensas: „Dormi! ne, eto mia, dormi mi ne povus!” — Mi kredas ke Kundert trovas min beleta; tion li estas dirinta al Jaŭpik; jes tiel li faris; mi estas fiero pri tio, ĉar Kundert...

Kundert, . . . sed li amindumas Kanjon, kaj li pinĉas ŝin en la brako! — Kanjo . . . tamen, ŝi estas multe pli malbela ol mi; ili diras ke ŝi estas ligna kaj fera; ili diras

Malgranda Rendert krietas denove, kaj onklino Hanske lulas, kaj kantas:

Eto, mia mia infan',
 Se ne sufiĉus la patrino man',
 Estos Anĝeloj kiuj helpon alport',
 Kiuj punos diablojn per mort!

He, kia ekbrilo!

Kiuj punos diablojn per mort'!

„Kredi malbonon de Kanjo⁴ estas ankaŭ diablaĵo”; en la biblo staras: „ne juĝu!” — Mi estas fera pri Kundert, sed estas ne permesata esti tiel; estus maldankeco! . . . maldankeco! — „Bona Jaŭpik!” mi vidas lin tiel volonte; kaj li — kiam li diris tion, en tiu mateno, tiam li ruĝiĝis, kaj mi ankaŭ ruĝiĝis. Naiva Jaŭpik! kial li parolis pri Kundert? — Kial? tial ke li estas bonulo kaj noblulo!

La eto ree krietas, kaj Hanske lulas, kaj Hanske kantas:

Eto mia, fariĝu matur',
 Eto mia, rest' ĉiam pur'.
 Demonoj timas la lumon brilant',
 Bonuloj serĉas la sunon ridant'!

„Ne, estas ne beleta!” mi depuŝis Jaŭpik
 malfeliĉa bonulo! li forrestas, forrestas tute.
 — Kiam mi vidas lin, tiam mi diros: „Jaŭpik
 jen estas mia mano!” kaj tiam, kiam Dio
 estos volanta

La eto estas maltrankvila, kaj Hanske lulas,
 kaj Hanske kantas:

Eto mia, mia trezor',
 Estas en vivo, ridi aŭ plor'!
 Dio cin helpos tra ĉiu ĉagren'!
 Post la mallumo, la hela maten'!

„Homo mia, kia brilo! la vitroj tintadas! kaj
 kia torento! — Feliĉe! Rikske restas dormadi,
 malgraŭ tion. Tion ŝi povas, kaj bezonas. — Mi
 ne timas! — Rendert kaj mi, ni neniam timis la
 fulmotondron! — Fulmotondro estas ankaŭ faro
 de Dio! — Jaŭpik ĝin timas nek ankaŭ! ne

Tion kantas Hanske, la beleta — aminda junulino,

interne la ĉambreto de la Alta Lando; sed tie ĉi, en la domo de la Malalta. Kampo sonas — kvankam ne tiel laute — alia tono.

Hannes staras en la pordo de sia domo. Tie li jam staris antaŭ ol la fulmotondro alproksimiĝis. Dum la alproksimiĝo kaj la sonon de la fortaj ekbatoj, li fermis la pordon, kaj iris en la ĉambron.

Kun la dorso turnita al la fenestro, li rigardas al la fajron kaj flanken al la skatoleto je alumetoj sur la kamenstrio, dirante al Jenke ke estas danĝere lasi la alumetojn en tiu loko, dum tia vetero, kaj ke li enpoŝigos ilin.

La virino ne atentigas tiun rimarkon, sed komprenigas Hannes ke ŝi estas maltrankvila pri Jaŭpik,

„Tiu sidos ie seke” opinias Hannes.

La fulmotondro pasas al la „Veluvo”. Hannes staras denove en la pordo de sia domo.

Ekbrilas kaj sonas en la malproksimo, sed la plej ege estas for. Tamen, malluma ĉielo, kaj pluvo je grandaj pluveroj. — Hannes staras kaj pensas. — Ne hajlo, ne brulo, — tie, ĉe li, nenio!

Antaŭ du jaroj, hajlis ĉe mi! — „Kiam mi povus turni la venton!”

„Mi bezonas iom da pluvo”, diris Rendert . . . Nun, jen li havas ĝin; kaj mi, miaj malaltaj —

malseketaj kampoj estas nenio alia ol ŝlimo kaj koto, plenaj je limakoj! — Tondra ŝajnsanktulo! ci prosperas, ĉu ne! ci estas tiel feliĉa! — La fojno, seka en la provizejo! kaj la mia — tial ke mi estas falĉinta iom pli malfrue — naĝas tra la kampo.

Ci estas tiel feliĉa, tiel kontenta, du infanoj, ĉu ne! „du infanoj”, kaj hontigi aliajn kaj sentigi ilin tion ĉiutage, ĉiuhore, kaj elsuĉi ilin preter tio. Ci estas tiel feliĉa, ĉio ajn estas alĵetata al ci, en ĉto ci estas enmiksata kial? tial ke ci hipokritas — kaj tial ke ci ĉiam havas la buŝon plena je Dio kaj amo, sed ankoraŭ multe plimulte tial ke ci havas la ŝviton de aliaj en cia poŝo tial!

Ci estas tiel feliĉa! — Kiam mi havus la povon, kaj la fulmon en mia mano nur unu radio! unu! — Ci estus al la

Denove ekbrilo! estas tamen teruriganta kiam ci ne atendas! . . . sed faras nenion, ne, . . . estas la posttondro! Unu radio! nur unu, en mia mano!

Jam de longe tenas Hannes la manon en sia poŝo, mi ne estas ĉiopova, sed eble jes, mi povus -- „Hannes!” sonigas voĉo en la ĉambro.

Hannes terurigas ekstreme, kaj li revokas, tute konfusigita: he, kio, kiu estas!

Estas Jenke, kiu petegas lin iri serĉi Jaŭpik.

„Jes, jes, mi iros!” respondas Hannes, kaj li meditas denove kaj pensas pri sia pli juna-, sola frato; kaj, dum la ekbriloj de fulmo intersekvas ree pli rapide, kantas Hanske:

Kiuj diablojn punos per mort!

Ĉu la anĝeloj detenas Hannes?

Ne. Post la fulmo refortiĝis, li meditas:

„Kial ne, Hannes?” por la gehomoj ne danĝero!
Iru kiam ci ne estas malkuraĝulo!

Aataŭen! Antaŭen! — Li ĉirkaŭrigardas
estas neniŭ, neniŭ kiu vidas lin. Estas tre malluma.

Kaj Hanske kantas:

Demonoj timas la lumon brilant',
Bonuloj serĉas la sunon ridant'!

Malluma! tamen sufiĉe da lumo por trovi tra
la fruktarbejon kaj la tabakkampon la vojon al

la Alta Lando. Kiam li iras ĉirkaŭ la arbetaĵon li alvenos malantaŭ la domo de Rendert.

Antaŭen! Antaŭen! la mizerulo!

Jes, la mizerulo!

Prudente li estas ferminta la stalpordon. Jen li iras; nigra makulo en la mallumo. Li marŝas sur sorbiĝitan argilon. Kio staras tie? Rigardante pli precize, li vidas ke estas la veturilo kiun Tenis estas forgesinta forigi en la stalo. — Tia azeno!

La lasta pripenso ne dekondukas lin „la mizerulo estas pikinta min, mi estas pikonta lin!”

Ĉio estas malseka, tre malseka. Ne malhelpo. Ŝajnas kvanzaŭ la fulmotondro revenos de la Veluvaj montetoj. He! kia radio! ankoraŭ pli nigra makulo en tia ekbrilo. Li haltas: „estas tamen terurega vetero Rikske kaj la patro diris, Amo”.

Ne, nun aŭ neniam! precize tian veteron mi bezonas antaŭen! antaŭen! La ŝancelaĵo estas for; jam li atingis la limon de siaj kampoj. La marĉa komunherbejo kiu etendas sin de tie ĉi ĝis la korton de Rendert, li trairas; la malgranda barilo en la arbetaĵo, kiu estas preskaŭ ne trovebla de fremdulo, estas prudente malfermita de la konato jen li estas sur la teritorio

de Rendert sur la korto de sia bofrato kaj fratino.

Dekstre kaj maldekstre suriras dudeko da brakoj ĉielen Kompato! — Ne! ne! Mi pikos lin! Antaŭen, antaŭen!

Rekomencas pluvi; siblanta radio subite iluminas la scenon; la nigraj masoj kun iliaj brakoj ĉielen estas la riĉsargitaj gren' — kaj fojnprovizejoj de la Alta Lando.

Bruega ekbato triligas la teron!

Ĉu la anĝeloj permesos? la diablon, ili ne forpelas.

Hannes premas la manon kontraŭ siajn okulojn, sed nun estas ree mallumo. Ne ŝtonfeto da distanco estas inter li kaj la provizejojn, kie li sed tiam — Kio, tiam?

La nigra makulo alproksimiĝas la plej altan provizejon; li haltas Ĉu li aŭdas ion de la flanko de la domo? Rapida deturniĝo, kaj li estas ne plu videbla; malantaŭ la larĝan fojnprovizejon sub kiu sin trovas malalta malfermita forigejo, li estas malaperinta. Ni sekvas lin. Jen li estas denove la nigra figuro. Ĉu lia koro estus batanta, — lia mano tremanta? Ni ne scias.

Ekkrakas! li faras paŝon malantaŭen, estas la tegmento.

Nun li alproksimiĝas la provizejon plie. Tiam

li ĉirkaŭprenas per la maldekstra mano palison.... Kion ci komencas? la dekstra mano faras fortan prenon supren, tiam tiu ĉi malsuriras; ree preno, ankoraŭ unu, kaj ree. Kial? La ĉiela lumo diros tion al ni. Li eltiras tiom da fojno el la provizejon, ĝis li atingas pli interne la pli sekan materialon — Nun ne plu. — Li aŭskultas. Ha! la demono havas cent orelojn! — Li daŭrigas sian laboron.

Ŝajnas li havas sufiĉe da seka fojno; li ĉesas labori, kaj malaperas. — Kien li iris? La mallumo plifortigata per la pluvo permesas apenaŭ distingi la nigran figuron; jes, tamen; li fleksas sin kaj malaperas en la absolute malluman forigejon sub la provizejo.

Kaj tie? blua lumo brilas, sed subite malaperas. Denove blua lumo! restadas,..... pliheligas,..... pliruĝigas. — Ankoraŭ blua flamo, sed pli granda, multe pli granda. — Ĉu estus la infero, tie? Jes, la infero en la koro! cento da diabletoj brulas; fajrodiabletoj!

„Hannes! Hannes!! Dio mia!” sonigas voĉo. — La blua flamo falas subite teren, kiam tiu ĉi ekkrio de timo kaj teruro resonas tra la malaltan kavon. La nigra figuro forkuras rapide. La anĝelo estas trafinta lin!

Kun imaĝa persekutanto al la kalkanoj, rekuras Hannes al sia korto. Ĉiufoje li timas ke la mano de la venĝonto prenos lin..... Kiu estas? Kiu? — Ju pli li alproksimiĝas sian domon des pli proksime li kredas la viron al li,..... Jaŭpik! — Jaŭpik.

Jam li estas atinginta la garbejon de sia propra korto. Nun li riskas malantaŭrigardon en la mallumo. Lasta-, hela radio de fulmo ekbrilas, kaj terurigas lin, kaj ree forpelas lin, sed samtempe, ungego ekprenas lin en la brusto,..... li falas dorse teren. — Dio! Dio! li ekĝemas laŭte..... kaj ĉiuj kvietiĝas.

Ĉirkaŭe, ĉion estas kvieta. La farmisto de la Malalta Kampo kuŝas senmove sur tero, kaj la veturilo kontraŭ kies timonon li alkuris tiel forte, staras tiel senmove kiel antaŭe. Nur la vento bruetas tra la arbojn, kaj la pluvo tintas sur la folioj.

Hannes kuŝas senmove, sed la junulo kiu serĉis rifuĝon dum la torento en la provizejo de Herbert, li tremas ankoraŭ pro konsterno.

En la krepusko, kaj je la komenco de la fulmotondro, li trairis la barilon de la Alta Lando. Apogante kontraŭ paliso de la provizejo li atendis iom da tempo. Li atendis tie, ĉar

tiam, tiel proksime al la domo, la penso, ke li estus pekanta kiam li enirus en ĝin, penetris en sian koron, samtempe kun la unua ekbrilo en la malluma ĉielo. Sed kion fari, kion fari nun? Meditante, li sidigis sur iom da ligno, antaŭe sub la provizejo. Kiam la pluvo egiĝis li retiris sin iom pli al la mezo de la forigejo, kiu por la plej granda parto estis plenigita je ligno, kaj tie li elektis returnitan puŝveturilon kiel sidaĵo.

Ĉu li maldormis aŭ songis.... li ne scias. Li aŭdis brueton, li vidis nigran figuron apud la fojnejo. La junulo estas tremeginta. Jen, la nigra figuro sin fleksis kaj proksimiĝis al li. La voĉo estas entenita en lia gorĝo; bluan lumon li vidis, fosforon li flaris..... Dio mia! — li ekrekonas lin, kaj eksaltas je la ekkrio: „Hannes! Hannes!! Dio mia!”, kaj eltiregas la brulantajn alumetojn el la manon de sia frato.

Kaj verŝajne samtempe, kantis Hanske:

Estos anĝeloj kiuj helpon alport',
Kiuj punos diablojn per mort'!

La frua mateno kiu sekvas la priskribitan vesperon, estas malvarmeta kaj agrabla. La cikonio sur la tegmento de la Alta Lando frapigas

gaje siajnflugilojn, kajflugendasuper la grenkampoj, irante kaj revenante, pli alta kaj pli malalta, en grandaj cirkloj. — Beno super la domo de Rendert kaj Rikske!

Post longtempaflugado ĝi revenas al sia nesto, flirtetadigas laflugilojn, direktas sian longan bekon al la rivero, ellarĝigas ilin denove, kaj.....

„Ĝi precize alflugas al mi” pensas la junulo kiu, sidante sur barilo laŭlonge la riverdigo, rigardas de kelka tempo al la grandan birdon. „Precize trans mian kapon!” tio estas feliĉo!

Kaj li kiu pensas tion ĉi, li havas malĝojan mienon.

Estas Jaŭpik. Kiam vi demandus al li pri kio li estas songinta dum la tutan nokton, li ne diras tion. Ne, tion li ne diros al ia ajn ĉielinda estaĵo, ĉar tio pri kio li songis estas preskaŭ la sama kiun li travivis en la hieraŭa vespero. — Homo mia! li ankoraŭ songas pri tio. Sed, estas eble imaĝaĵo. Ne, ne! estas ne ebla, povas esti ke li intencis ekbruligi lian pipon, ke li..... Homo mia, kiel estis malluma! — Tia nigra figuro, tia blua flamo! tiu kriego! for, tiu songo! for de mi! — „De ia alia”, pensas la junulo: „labori” estas la plej bone! ok tagojn mi estis interne, tial ke Hannes pretendis

mi ne povus marŝi; kiam mi ne laboras, mi fariĝas tiel stranga kaj songema. — Dank' al Dio, ke mi povas rekomenci labori! sed Rikske! estas tamen ege ke mi estas ankoraŭ ne vidinta ŝin.

Kaj pensante pri Rikske kaj pri multe da alia, la figuro de Hannes ree aperas en lia spirito, sed..... tiel nigra..... tiel abomena,..... tiel trompiga.

Kio sonas tie? „Tjuke tjuk', tjuk' etjuk'” — La vizaĝo de Jaŭpik fariĝas fajrruĝa; li volas,.... li estos,..... rigardas dekstren, maldekstren, flanken, malantaŭen, kaj rapide ekstarigante, li rigardas ankoraŭ denove tien, aŭdas la tjuke tjuk', tjuk' etjuk' alproksimiĝi, vidas ion brilantan, kaj transsaltas la barilon, kaj malsuprenkuras kiel eble plej rapide la digon, tial ke..... jes, kial, li ne scias.

Jaŭpik staras malsupre la digon. Transsalti tiun larĝan kanalon, li ne povas, kaj al kio tio ĉi servus? Kuŝiĝi sur teron, tiel ke li estos nevidenla, almenaŭ ne ekrekonebla? jes, sed la herbo estas tiel malseka, kaj..... „Tjuke tjuk', tjuk' etjuk'” sonas pli laŭte, kaj jam tre proksime, kaj beleta voĉeto sonas de supren:

„Nu Jaŭpik, kiel ci fartas”?

„Ki' ci" balbutas Jaŭpik, kaj krepuskiĝas antaŭ liajn okulojn.

„Halt' Graŭke, halt'!" — „Ci ne vidigas cin sur kampoj nek vojoj" sonas de supren.

„Jes jes", estas la distrata respondo.

„Ĉu ci ne plu pensas pri ni" demandas la beleta voĉeto: kaj poste „Ĉu ci ne suprenvenos?"

Li marŝas supren, sin surtirante al la longa herbo, kvazaŭ alie li falus. Ŝajnas li havas plumbon en la ŝuoj; ruĝa li estis, blanka li estas nun, blanka kiel kremo.

Aŭskultu kion ili interparolas:

„Mi povas vidi ke ci estis vundita"

„Estis mia piedo, sed estas ne plu grava"

Hanske, ridante: „Tion mi estas ĵus observinta, Jaŭpik, ci supenkuris la digon kiel leporo!" sed kiam ci povas marŝi tiel bone, kial ci do ne estas veninta al la Alta Lando?

„Tial, tial tial ke ci

„Ĉu mi estas la kulpiginto?" interrompas Hanske, sed subite ŝi silentas, kaj ankaŭ ŝi ruĝiĝas. — Hup' Graŭke, hup'! — Ĉu ci kuniros iom kun mi, Jaŭpik?

Graŭke obeas, Jaŭpik kuniras, kaj Hanske daŭrigas: „ci tamen povus esti visitinta Rikske, ha, ŝi havas tian beletan eton!

Jaŭpik, kvazaŭ li jam estas vidinta lin, respondas: jes, vere!

Similas Rendert precize, kaj similas ankaŭ min; tiel almenaŭ diras Rikske.

Jaŭpik rigardas ĉiufoje al Hanske: „do li devas esti tre beleta infaneto” li diras, kaj tuj poste: „Mi foriros, mi reiros hejmen!”

„Ne, tion ci ne faros” diras Hanske boneme: — Jaŭpik, mi deziras ci estos iranta al Rikske, kaj ke ci donu al mi cian manon, kaj tiam ree paco kaj amikeco!”

Graŭke, kun sia kapo teren, daŭrigas sian vojon, sed Hanske haltigas; ŝi levas siajn blujajn okulojn al la junulo, kaj diras: „Jaŭpik, ci estas bona Jaŭpik! mi estas depuŝinta cin, sed tion mi faros ne plu, donu al mi la manon?”

Hanske ne konjektas ke tute alia kaŭzo iĝigas la junulon tiel malbruta; sed Jaŭpik, kvankam li ne komprenas kial Hanske parolas kvazaŭ ŝi estas farinta ian malbonon, ne kuraĝas ion diri. Ne, ne, absolute ne! — En unu sekundo dek ekpuŝoj en la koro. Paroli li ne povas. Fine li balbutas: „Bona Hanske”, kaj li metas sian manon en la ŝia; liaj okuloj malseketiĝas, kaj ankaŭ ŝiaj sunetoj, kaj ree daŭriganta la vojon flanke de la junulino, li diras iom poste; „Sed Hanske, tiu unua,

de ci kun mi, tio ne povas kaj estas malpermesata!" — Hanske komprenas nur duone, kaj parolas denove pri Rikske kaj ŝia infaneto, kaj demandas Jaŭpik, ĉu li iros viziti ŝin.

„Ne, ankoraŭ ne!" antaŭe mi devas ion diri al ci!

„Kion, Jaŭpik?"

La junulo, dum li forpelas la tabanojn kiuj estas turmentanta Gruŭkon, diras: „Ci scias Hanske, pri ci kaj mi, kaj pri loĝi en la sama dometo, kaj ke mi deziras laboradi de la mateno ĝis la vespero, por esti ĉiam ĉe ci, Hanske!" tion ci scias, kaj ankaŭ ke ci estas dirinta, esti tro juna por pensi pri edziniĝi, kaj ke mi devus nur foriri!

Jaŭpik silentas dum kelke da tempo, kaj tiam li reprenas: „de tiu tempo mi sciigis ion alian, tute alian!"

La junulino estas dankema ke Jaŭpik ne rigardas en ŝiajn okulojn. Ĉu li estus kompreninta tion kion ŝi estas pensinta pri Kundert el „la Atako?"

Ŝi malsupreniras la digon. Halt' Graŭke, halt'!

Jes, ŝi jam staras apud la barilo de la herbejo, kaj Jaŭpik estas malrapide sekvanta. Graŭke estas jam deŝargita, sed la ŝarĝo de la junulo pezas lin kiel plumbo sur la koro.

Kaj la junulino, kiu estas jam melkanta sidante sur la kalkanoj, duone deturnanta al Jaŭpik, demandas mallaŭte: „Kio do estas, Jaŭpik”? — Ŝi esperas ankoraŭ ke koncernas ian alian ol kulpigo.

Kaj estas ia alia! ia tute alia! estas sensencaĵo, mensoĝaĵo! — Ne de Jaŭpik, ne! de Hannes: la maljuna Herbert estus dirinta tian, ke li malpermesus Jaŭpik, edziĝi, tial ke tio iĝigus lin malfeliĉa? Naiva Jaŭpik! pri tia li kredas Hannes! — Bona Jaŭpik! li kredas tion!

La ŝarĝo estas for de la junulo, Hanske estas dudek funtoj pli malpeza.

Nun ŝi ne sidas pli longe je la dorso deturnita de Jaŭpik. Ŝi rigardas lin per siaj belaj okuloj; ĉirkaŭ ŝia beleta buŝeto sin montras rideton, kaj kiam ŝi laŭte ripetas „estas sensencaĵo, estas mensogo, Jaŭpik!” tiam ŝi ridas de tuta koro! Kaj li, li ne sentas inklinon al ridi — sed, kiam li estas vidanta kiel kore la aminda junulina ridas, tiam li ne povas forlasi blekridi — kiel en tiu mateno —, kaj li ne komprenas kial, — sed, li devas ridi kiam li vidas tiujn gajajn sumetojn.

Kaj kiam ili estas lacridinta, kaj Jaŭpik rigardas la blondulinon en la okulojn kvazaŭ li volas

diri: „Kiel ni devas tiel ridi!”, tiam ŝi ne ŝancelas pretendi: „ke Hannes estas mensogulo, kaj ke ŝi mem ofte — eĉ ankoraŭ hieraŭ — estas aŭdinta ke la maljuna Herbert parolis tute alie!” — Rikske scias ĉion pri tio, kaj pravigos ŝin.

Jaŭpik, la bona Jaŭpik, rigardas kvazaŭ li vidas ian belan, kaj vere, li vidas ian belan: belota-, malgranda virineto, ŝi estas! se ne estus tiel stranga, li ŝmacus ŝin!

Ĉu Hannes estas mensogulo? ankaŭ tia?”

Jaŭpik rigardas supren. estas kvazaŭ li ree vidas ian belan. Estas tiel! Trans la riveron la cikonio estas revenanta! jes, al ili, al Hanske kaj al li! precize trans iliajn kapojn, al ĝia nesto! — Feliĉo!!

Kaj Graŭke sonigas sian „I-aŭ I-aŭ!” — estas „azena”, ¹⁾ ili diras en la Betuvo! Hura!!

Alia-, tute alia sono aŭdigas sin en la kuirejĉambro de la Malalta Kampo. Sed la junulo kiu ni renkontis ekstere, ne scias ion pri tio. Li ne konjektas kia terurajo estas trafinta sian fraton, nek en kiaj animitoj Jenke transvivis la nokton.

¹⁾ azeno-lingvo.

Kia nokto, por tiu malfeliĉulino! — Strange, sen diri unu vorton revenis Jaŭpik hejme en la vespero. Sen iom manĝi, li tuj iris al sia dormoĉambreto. Jenke eatas vidinta tion, kaj, kontente ke li estas hejme, ŝi ree okupas sin de sia laboro, atendente la revenon de Hannes.

La naua-, la deka-, la dekuna horo estas pasinta, sed Hannes ne revenas. — Maltrankvileco. — Ŝi estas elirinta, kredante audi ion apud la malgranda garbejo, — estis tre malluma. — Alproksimiĝante, ŝi aŭdis ĝemajon, kaj Ve Dio! jen li estis kuŝanta sur tero, hom' mi', tiel terura! tiel terura!

Kion ŝi estas tiam farinta aŭ parolinta, ŝi ne plu scias, sed Tenes, la laboristo, estis helpinta ŝin. Hannes estis transportita al la domo kaj enlitiĝita. Tenes estis sidiĝinta sur la ĉevalo, kaj reveninta kun la kuraĉisto, hom' mi'. kia nokto!

Vejnodeŝarĝi, kupiĝi, hirudoj. Jenke estis daure okupinta; kaj la kuracisto diris ke estas sangel-fluo en la brustkavon, — tre malmulte da espero, devas estinta ekpuŝo kontraŭ la bruston; en la posttagmezo li revenus.

Kiam la kuracisto foriris, estis matenkrepusko. Hannes estis iom pli kvieta, kaj Jenke, je la

unua intertempo en kiu ŝi estis libera, estas irinta al la ĉambreto de Jaŭpik, sen ian bruajon, por rakonti lin kio estis okazinta. Sed Jaŭpik estis ne plu en tiu ĉambreto. — Jaupik! kiam ii estas farinta tion! — Ne, ne povas esti!

Vidu Hannes. En tiu ĉi momento li vekigas el mallonga senkonscieco; kiel profunde li spiras, kiel malfacile, kiel dolore! La plej doloraj krioj estas elpuŝitaj el lian duonfermitan buŝon. Al klarigi kio okazis dum lia reirado de la Alta Lando, la forto lin mankas, ĉar nur tre malofte li povas paroli malmulte da vortoj. Kiam Jenke demandas al li: „Hannes, ĉu mi venigos Rendert”, li respondas spirege kaj malforte „Ne!”

Tie li kuŝas, la malfeliĉulo, kaj tio kio maltrankviligas lian koron, jes tio estas eĉ pli malvarma ol la spiro de la morto kiun li jam sentas. Tie li kuŝas, batalanta kontraŭ lian Kreinton, kontraŭ lian Jugonton!

Kaj, ŝi, la per naturo tiel bonkora virino kiu estas vivinta preskaŭ sep jarojn en tiu sfero de enviaĵo kaj jaluzaĵo, kio cirkulas en ŝian animon? Ve! plendadas ankaŭ ŝi: „Aliaj nur la bonon, ni nur la malbonon! — „Estu, ke Hannes estas iel malafabla kaj iel jaluza, kion li malfaris al alporti lin tiom da mizero”? — Prospero ĉe Rendert,

malprospero ĉe ni! — Eniri lian domon! neniam!... kaj, post forta ekkrio de Hannes: „Jes Hannes, jen mi estas!” — Ve! . . . Dio mia! lasu al li la vivon!”

Vivi, kial? Vivi, eble por, post iom da tempo, kulpigi la junulon kiu enportas en lia koro tian teruran sekreton, pri la krimo kiun li men intencis efektivigi, eble por kulpigi lin pri frat-mortigo? Ne, tiu ĉi lasta ne!

Teruriga momento! malfacila- forta tuso sonas en la ĉambro, kaj estas sekvata de malĝoja sceno!

Jenke prenas la manon de la suferanto, — „Granda Dio!” Ŝi ne scias kion fari, kiel helpi. Tremante, kaj ekpuŝigata de tuŝeco, ŝi kuras al la pordo, — ree sonas ekkrio de la suferanto; — Pro teruro ŝi haltas, ekkriante: „Helpu! helpu!!

La ĉambropordo malfermiĝas. Du viroj eniras. Kiu ili estas? Ŝi vidas ilin apenaŭ. Genufleksante antaŭ la lito, ŝi ekkrias: „Dio mia! li mortas!!

Kaj la du viroj, profunde kortuŝata ili staras apud la malfeliĉa virino. Nur antaŭ kelkaj minutoj ili sciigis de la laboristo, kio estas okazinta. Jen ili estas, Rendert kaj Jaŭpik, kaj ŝajnas kvazaŭ la plej junan la sango malfluigas en la vejnoj. Plorego eliras de lian buŝon, kaj tiam, tiam li revirigas sin kaj li prenas la

manon de lia frato, kaj li paroletas: „Hannes Amo, diris la patro!”

La suferanto malfermas la okulojn. La malhela rigardo trovas la junulon, kaj la viron flanke de tiu ĉi. Kia esprimo designas sin sur la mortpala vizaĝo! Unu fortega klopodo, unu profunda spirpreno..... „Favoro!” sonas en la ĉambro.

Favoro!..... — Tio estas la lasta.

Ne mirindaĵo ke la okazo estas multe priparolata. Oni ne parolas pri ia alia en la malgranda Betuva vilaĝo; ankaŭ en la najbaraĵo oni aŭdis pri ĝi, kaj rakontis baldaŭ pli ol tio. Sed kion ajn oni babilas, pligrandigas, aŭ eĉ kalumnias, la vero — tiel kiel konata — ŝutas sufiĉe da materialo al priparoli, kaj da faktoj kiuj vekigas la kompaton.

Al serĉi Jaŭpik, eliris Hannes tiun vesperon; pro la pluvego reirante rapide hejmen, li ne vidis la veturilon pro la mallumo; li ekpuŝis kontraŭ ĝin, kaj rompis sian brustoston.

Krimo, ne eble! la vilaĝestro kaj la kuracisto, ili men, estas vidinta kiel la piedpostsignoj de Hannes sin depresis precize ĝis la timonon de la veturilo, kaj ke tieloke forglito estis videbla, kaj ke la alto de la timono estas precize la alto de la brusto.

Estas ne mirindaĵo ke Jenke trovas en tiaj cirkomstancoj multe da kompato, nek ankaŭ stranga ke amo kaj boneco de frato kaj fratino ĉirkaŭas la junan vidvinon. „Amo!” estas dirinta la patro, kaj Amo, ĝi restos. Ĉio estas ordata kaj aranĝata de Rendert. La korton de Jenke li administras kiel la sia. Rikske, la bona Rikske, apenaŭ refortigita, estas ĉe la malfeliĉa Jenke por paroli al ŝi vortojn de amo kaj konsolo. Amo pelas Jaŭpik. Li silentis, kaj silentados. Tiun aperaĵon en tiu malluma vespero li klopodas forgesi; „Ke Dio pardonu al li!”

Kaj iom post, amo ankaŭ malfermas la koron de la vidvino. Kun honesta rigardo ŝi povas ĉirkaŭvidi. Tamen, ŝi neniam parolas pri li kiun ŝi iam amis super ĉion. Kaj la horo estas proksime, en kiu ŝi komprenos, ke kune kun li iom da malbela subiris en la tombon.

Ŝi povas ree ĝojigi pri paco kaj la feliĉo de aliaj, kaj kredi tion, kion Hanske foje kantis:

„Post la mallumo, la hela maten'!”

Rigardu al ŝi! — Estas du monatoj pli malfrue. Tridekkvar fojojn ŝi kunvivis tiun ĉi tagon kiel sia nasktago. Antaŭ ŝi, sur la tablo, la necesujo

de la patrino; en la mano ŝi tenas la oran seruron kun la grenadoj. Rikske kaj Rendert alportis ĝin al ŝi, kaj Jenke rigardas ilin; la larmoj fluas ŝin laŭlonge la vangoj..... tiuj objektoj rememoras ŝin.....

Ŝi ploras, kaj, kun la brakoj ĉirkaŭ la kolon de Rikske, ŝi ekvokas: „Rikske! Rendert! tiom da amo mi ne meritas!”

En la vilaĝo oni parolas ne plu ofte pri la malfeliĉa okazo.

Estas neniu kiu deziras ke Hannes estu ankoraŭ vivanta en la rondo de la kvietaj vilaĝeto! neniu! — Oni parolas ne plu pri Hannes. La vintro blovis sian malvarman spiron trans ĉion kio koncernas lin. La cikonio estas denove reveninta; oni parolas pri ia alia.

Aŭskultu! — Morgaŭ estos Dimanĉo, kaj morgaŭ estos festo. Estas jam malfrue en la vespero. La turokloŝo jam sonigis la dekunan horon. Tie, en la granda garbejo de la Alta Lando, sidas kvaroj, ĉirkaŭ grandan kuvon: tri beletaj farmistinoj, kaj Jenke, la vidvino de la Malalta Kampo. En la kuvo sin trovas floroj kaj folioj; kaj, en la lumo de la granda stallanterno, ili plektas fervore, girlandojn.

Ĉie floroj', ĉie rozoj',
 Ĉiu gaja, ĉiu ĝoj'!
 Kiel bele, tia ar'!
 Ĉiom por la juna par'!

Tiel kantas la virinoj en la rondo, kaj Jenke, kvankam ne kunkantanta, plektas tiom pli rapide, kaj Kundert el „la Atako” malsekigas la girlandojn kiuj estas jam pretaj, kaj poste li kisas Kanjon tiel forte sur la kolo, ke ŝi efektive timas. „Bone! Bone!!” ekvokas Rendert, kiu rigardas al la kuniĝantojn: „estos baldaŭ via tempo al enŝipigi cin!” — „Post unu monato!” ridas Kundert; kaj Kanjo ridas kune kun li: „Kiam mi ne diros: ne!” Ha! Ha!! tion ci ne faros, ŝercas Rendert. — Kaj ree sonas:

Ĉie floroj', ĉie rozoj',
 Ĉiu gaja, ĉiu ĝoj'!
 Kiom da bela en tiu ĉi ar',
 Tiom da beno por la juna par'!

Ke estos morgaŭ Dimanĉo, ĉiu scias, sed ĉiu scias ankaŭ ke morgaŭ Jaŭpik kaj Hanske fariĝos paron antaŭ la predika seĝo. Antaŭ la vilaĝestro ili edziĝis jam hieraŭ; sed tio diras nenion!

Morgaŭ! — Jaŭpik, kvankam li enlitigis, li ne povas dormi; tie sur la seĝo kuŝas — tre precize en la krispoj — pantalono, kaj veŝto, kaj frako; ĉiuj tute novaj, brilantaj en la lunlumo. Tie, sur la komodo, kuŝas la nova-silka ĉapelo, kovrata de ruĝa naztuko, kaj preter tio, apude, la poŝhorloĝo; la argenta poŝhorloĝo; je ĉiu „tiketo” tiom pli proksime! — Ravige! Ĉiam pli proksime. Sed la patro gravurigas en la klapo de la poŝhorloĝo: „Donaco al Jaŭpik, kiel edziĝonto”. — Do, esziĝi estas permesata. „Dank’ al vi, patro! — Dank’ Dio, al Vi!”

Morgaŭ! — Morgaŭ Hanske estos feliĉa! Tion ŝi sentas, sed tamen, estas la lasta vespero el feliĉa juneco, la lasta! Dormi, ŝi povas tiel malmulte. Ŝi scias ke tie en la garbejo, ili plektas girlandojn el verdaĵo kaj floroj, sed la vivo ne estas ĉiam tiel bela! — Ia alia beligos ŝian vivon. Tie ĝi estas, la verda muslina jupo en kiu ŝi morgaŭ edziniĝos; tie ĝi kuŝas, la biblio je argentaj klampoj, la biblio konservita de Rendert kaj surskribita de la maljuna Herbert sur la unua paĝo: „De la patrino, al la fianĉino de Jaŭpik”. Do, edziniĝi estas permesata. — Religio kaj Amo! Amo kondukos ŝin en la vivo kaj en la eterno!

Ŝi genukflexas, la beleta junulino, apud la seĝo sur kiu ŝia edziĝrobo pendas. Ŝiaj falditaj manoj ripozas sur la libro kies fundamento estas Amo, kaj kiam ŝi preĝas plena je kredo kaj espero ili kantas en la garbejo:

Kiom da bela en tiu ĉi ar'
Tiom da beno por la juna par'!

De du jaroj estas ankaŭ cikonionesto sur la tegmento de la Malalta Kampo.

Komence la birdo venis, foriris en la aŭtuno, sed revenante en la printempo, tiam tiam ĝi kunportis ion! — Kaj kie?

Kunvenu! En la kuirejĉambro, malantaŭ vent-ŝirmilo, estas ia beleta! Vi jam ekvidas; forigu nur la kovratukon, Hom' mi'! kia beleta-, malgranda kapeto! — Ĉu tiu estas infaneto de Hanske?

Hanske, nuntempe ne plu junulino sed edzino belata, sed ronda kiel bareleto, ŝi staras malantaŭ la lulilo, kaj respondas: „Jes de mi, de Jaŭpik kaj mi! de mi mem!”

Kaj li de kiu la eto estas ankaŭ, • li ne povas

forlasi alproksimiĝi, kaj rigardante trans la ŝultron de Hanske en la lulon, li blekridas: „Ha. ha! kie estas la patro!”?

La eto ne diras ion; ĝi ne povas, sed kiam ĝi povus, tiam ĝi ripetus tion kion ĝia patrino diras: „Tie, tien li estas, kaj li estas plej bona! — Bona, laborema — ĉiam —, ju pli longe des pli forte, des pli energie. La majstrumo de la kulturo, tiel efika kiel la plej bona. Nur naiva, naiva en la malbono! jes! tiel la eto devos iĝi, iĝos mia karuleto!” Kaj la ronda patrineto malbutonumas sian jakon, al ektrinketigi la infaneton; kaj Jaŭpik restas alrigardi tiun ĉi carman sceneton.

Sed ankoraŭ unu ĉeestas tiun ĉi vere belan sceneton; estas fratino Jenke, ŝi, la seninfanulino. Ŝi ĝojiĝas pri la feliĉo de la aliaj, kaj sur la Malalta Kampo ĉiu sentas sin feliĉa, tiel kiel ĉiu sur la Alta Lando!


Kion la maljuna Herbert akcentis sur sia mortolito, tio brilas en la okuloj de Hanske dum ŝi nutras sian infaneton, Amo!


Estas vespero. Rendert kaj Rikske venos tuj al paroladi unu horeto; Jenke okupas sin preparante la manĝaĵon sur la fajro, Jaŭpik rigardas al tio, kaj aŭdas la terglanojn sibli en la potoj.


Sed li aŭdas ian alian, ĉar Hanske, lia propra


Hanske, je sia piedo sur la lulilo, kantas tiel gaja
kiel turdo :


Eto mia, fariĝu matur'
Eto mia, rest' ĉiam pur'
Demonoj timas la lumon brillant',
Bonuloj serĉas la sunon ridant' !











BIJ DEN UITGEVER VAN DIT WERK ZIJN
MEDE VERSCHENEN :

HENDRIK CONSIENCE. Blinda Rozo, Esperantigita la Flandra lingvo de Sinjorino EDM. VAN MELCKE- BEKE- VAN HOVE	f 0.50
PROF. THÉOPHILE CART. Een Uurtje Esperanto. Voor Nederland bewerkt door R. H. HOMULLE.	„ 0.15
LA HOLANDA PIONIRO, Deel I, 224 blz.	„ 1.25
LA HOLANDA PIONIRO, Deel II, 113 blz.	„ 0.75
KELKAJ FLOROJ ESPERANTAJ. Nummer 1—5. AGRABLAJ LEGAJOJ KUN MULTAJ ILUSTRAJOJ. Per nummer	„ 0.12 ^s
D. F. ROMEIN. Het Vraagstuk eener Wereld- taal en het Esperanto.	„ 0.12 ^s
DREVES UITTERDIJK. Volledig Leerboek van het Esperanto met dubbel woorden- boek en oefeningen	„ 1.50
DREVES UITTERDIJK. Oefenings-boekje voor het snel aanleeren der Wereld- hulptaal Esperanto door zelfstudie	„ 0.50
DREVES UITTERDIJK. Sleutel bij idem.	„ 0.50
DREVES UITTERDIJK. Samenspraken, Es- peranto-Hollandsch	„ 0.40
A. J. WITTERYCK. Het Esperanto in tien lessen. Tweede uitgave	„ 0.30
PAGOJ EL LA FLANDRA LITERATURO Kolektitaj kaj tradukitaj de Dr ^o MAURICE SEYNAEVE kaj Dr ^o RAYM. VAN MELCKE- BEKE	„ 0.75